



PENSEO

N-ro 316

feb. / 2018

Monata Beletro Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 29-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Maria Nazaré Laroça (Brazilo)



Trairado

Dum la vojaĝo de l' vivo
multaj estas trompitaj
de la ruzeco de l' pado,

Ĉar la vojo estas longa:
ĉiam transiranta supren,
ĉu oni volas aŭ ne.

Tamen, vojeto mallonga
estas negrava detalo,
kvazaŭ tranĉo de l' sorto.

Oni bezonas trairi
la tutaĵon de la vojo;
ĉu en sonĝoj de flugo,
aŭ eble inter la dornoj,
kiuj minacas l' irejon.

Pasaĝeroj de l' eterno,
ni estas vagantaj lumoj,
al ĉiel' aŭ infer' strebe.



Juiz de Fora, 07/12/2017

Memadoro

La animo de la poeto tediĝas de la
amaskomunikilaj rakontoj, de la potencigo de
banalaj egoj, kiuj fariĝas reĝoj dum senfinaj
dek kvin minutoj da famo.

En ĉi tiu serĉo pri la rolo de protagonisto,
ĉiuj havas ion tre gravan por diri proze kaj
verse. En la galimatio de lumĵetiloj, la volupto
de videbleco estas la plej arda deziro.

Rio, 14/12/2017.

Banala intrigo

Ene de la bobelo,
l' okul' gvatas la mondon
de ĉiu, kiu sin elmontras
en sia feliĉa kokono.

Kaj l' okul' tre fieras
ĉar ĝi povas havigi al si
tiom da aferoj!

Juiz de Fora, 18/01/2018.

Hans-Georg Kaiser (Germanujo)



Laŭ ĉiesplaĉo

La patro kun la juna filo
azenon portis al foiro.
La patro en la selo sidis,
la filo la azenon gvidis.

Survoje venis hom' renkonte,
kaj tre indignis: "Estas honte!"

Jen viro en la sel' komforta,
dum marŝas la infan' malforta."

La patro, je l' indigna voĉo,
sin savi volis de riproĉo,
de la azeno do descendis
kaj rajdi sian filon sendis.

Sed ree venis hom' renkonte,
kaj tre indignis: "Estas honte!
Jen knabo en la sel' komforta,
dum marŝas la aĝul' malforta."

La knabo, je l' indigna voĉo,
sin savi volis de riproĉo,
do saltis de l' azena dorso.
Nun ambaŭ marŝis, sen rimorso.

Sed venis homo, miris multe,
kaj kriis: "Vere, estas stulte!
Dum vi lacigas vin per marŝo,
promenas la azen' sen ŝarĝo."

Do, kion fari? Patro, filo
demandis sin kun maltrankvilo.
Interkonsilis kaj decidis:
Nun ambaŭ en la sel' eksidis.

Sed ree venis hom' renkonte,
indignis ege: "Estas honte!
Sur povra besto ŝarĝ' duobla!
Fi, kia kruelec' malnoblaj!"

La du, en malesper', per ŝnuroj
l' azenon ligis ĉe la kruroj,
kaj ĝin per stango traŝovita
plu portis kun klopodo ŝvita.

Sed venis hom' kaj ĝis eksceso
ridante kriis: "Jen frenezo!
Azenon vivan oni portas!
Ho ve, mi de ridego mortas!"

La patro diris al la filo:

"Mi estas vere sen konsilo:
Ĉu la azenon do mortigi,
aŭ nin ĉe kol' sur branĉon ligi?"



*adaptita el Ezopa saĝo de Kolomano
Kalocsay*

la originala poemo de Kalocsay:

65. LAŬ ĈIES PLAĈO

La patro kun la juna filo
azenon portis al foiro.
La patro en la selo sidis,
la filo la azenon gvidis.

Survoje venis hom' renkonte,
kaj tre indignis: "Estas honte!
Jen viro en la sel' komforta,
dum marŝas la infan' malforta."

La patro, je l' indigna voĉo,
sin savi volis de riproĉo,
de la azeno do descendis
kaj rajdi sian filon sendis.

Sed ree venis hom' renkonte,
kaj tre indignis: "Estas honte!
Jen knabo en la sel' komforta,
dum marŝas la aĝul' malforta."

La knabo, je l' indigna voĉo,
sin savi volis de riproĉo,
do saltis de l' azena dorso.
Nun ambaŭ marŝis, sen rimorso.

Sed venis homo, miris multe,
kaj kriis: "Vere, estas stulte!
Dum vi lacigas vin per marŝo,
promenas la azen' sen ŝarĝo."

Do, kion fari? Patro, filo
demandis sin kun maltrankvilo.
Interkonsilis kaj decidis:
Nun ambaŭ en la sel' eksidis.

Sed ree venis hom' renkonte,
indignis ege: "Estas honte!
Sur povra besto ŝarĝ' duobla!
Fi, kia kruelec' malnoblaj!"

La du, en malesper', per ŝnuroj
l' azenon ligis ĉe la kruroj,
kaj ĝin per stango traŝovita
plu portis kun klopodo ŝvita.

Sed venis hom' kaj ĝis eksceso
ridante kriis: "Jen frenezo!
Azenon vivan oni portas!
Ho ve, mi de ridego mortas!"

La patro diris al la filo:
"Mi estas vere sen konsilo:
Ĉu la azenon do mortigi,
aŭ nin ĉe kol' sur branĉon ligi?"

Paulo Silas (Brazilo)



Malliberigi

Ŝancelvagante sub elektorajnt' altruda,
Bruston malfermis kaj konsentis
Kun fort' ekstera, kiu intencis
La koron premi per devligitec' insulta.

Pentrist' nenion volis plu pentri,
Ĉar form' linia rabis lokon de bel' kurba.
Kaj la Scienc' malpacienis:
Uzeblo gravis pli ol paŝ' al nivel' supra.

Sincer' surplace tiutempe vane pledis
Por plenumiĝo de Justec', en kiu kredis
Nenies penslogik' normala.

Memorteni devas do almenaŭ l' idealon,
Ke la venontaj progrescikloj de l' Homaro
Ne baru la Liberon karan.



Reveno

Mi stumblis kaj falis de sur l' evoluŝtupo.
En akvoj pasintaj, refoje mi baraktis.
Ne pro aliula! Pro mia propra kulpo!
Se supren-suben la medi' min tiel traktis.

En mar-mallumo, dilatiĝis la pupiloj.
Kun skvamoj kaj blankoj, kun vosto kaj
naĝiloj...

Unuaj stadioj min logis retropaŝi
Profunden por iri sekreton ĉi malkaŝi:

De kiam, la bazaj partikloj kuniĝis lerte
Kaj donis formon al la universo tuta.
Kaj kie kaj kiu elkovis plej diskrete,

Ke pelis la homojn ĝis tiu debat' akuta,
Ĉu ilin kreis la principo vortpotenca
Aŭ multvaria vivkruciĝo tre intensa.

Mori (Usono)



AFORISME (28)

Antaŭ la Kunkuŝo
pensu pri
akuŝo.

Pri la krimoj de
kruelaj despotoj
respondecas ankaŭ

stultaj patriotoj	***	en kaĝo.
kaj indiferentaj idiotoj.	Kie vivrimedo	***
***	por ĉiu homo	Religio
Pri pano de	estas sufiĉa	kiu ne devigas
stultuloj onidire	tie ĉiu homo	homon esti pacema
zorgas Dio	estas feliĉa.	kaj afabla
sed saĝulo mem zorgu	***	estas afero diabla.
pri sia pano kaj ĉio.	Zorgu	***
***	pri vi	Kie ĉiu homo zorgas
Nur kanajloj	kaj via najbaro	nur pri sia ĉapo
kaj friponoj	kaj la cetero	tie estas sekura
kaj stultaj patriotoj	de la homaro.	nenies kapo.
submetas sin	***	***
je la servo de	Konduti pace	Dio de despotoj
despotoj.	kun malamiko	kaj torturistoj
***	estas la plej saĝa	kaj teroristoj
Zorgi pri	politiko.	kaj ...
pureco de la naturo	***	skorpio
kaj sano de la tero	Saĝa politikisto	ne estas mia Dio.
estas la plej nobla	parolas pace	***
afero.	kaj la malsaĝa	Homo kies grandeco
***	parolas minace.	dependas de lia mono
Muro	***	aŭ posteno
inter domoj	Tiuj, kiuj interbatalas	envere ne estas
estas bona,	pro Dio	granda persono.
sed malbonas	fakte batalas	***
muro inter homoj.	pro nenio.	Ĉu ĝojo kaj prospero
***	***	aŭ sufero kaj mizero
Homo al kiu mankas	Tiuj, kiuj kredas	sur la tero?
laboro kaj pano	je afabla Dio	Jen la plej urĝa
facile submetas sin	kial do kondutas	pripensinda afero?
je la servo de tirano	kiel skorpio?	***
kaj onidire ; Satano.	***	La plej grava
***	Azeno	parto de libereco
Mizero	pli rapide lernas	estas libereco de
estas la ĉefa kialo	de sia eraro	penso kaj menso.
de krimoj kaj bataloj	ol homo	***
sur la tero.	de sia misfaro.	Sekureco
***	***	kaj libereco de
La ununura bona	Libero kaj prospero	parolo
batalo	estas por popolo	estas la bazaj rajtoj de
sur la tero	kun saĝo kaj kuraĝo	popolo.
estas batalo kontraŭ	popolo malkuraĝa	***
maljusto kaj mizero.	vivas mizere	Homoj

kun la cerbo
de paseroj
ofte decidas pri
gravaj aferoj.

Idiotoj ne mankas
sur la tero
ĉar pensado estas
malfacila afero.

Kial homoj ne povas

vivi kiel kolomboj
sen armiloj,
sen bomboj!?

Sen stultaj politikoj
ĉie homoj kunvivus
pace,
samkiel amikoj.

Saĝaj homoj
voĉdonas

por saĝaj patriotoj
por la ceteraj
kandidatoj
voĉdonas idiotoj.

Homo
estas pacema
kiel kolombo
sed nur en la tombo.

Shu Ting



Al kverko

se vin ja amus ja mi,
mi malkiel la kampsid' rampanta,
pavus pere de branĉaro alta de vi.
se vin amus ja mi,
mi ne imitus am-avidan birdon
kiu gurdas amon al la verda ombro per enua la
ari'.

jen mi estu fonto
mi tutjare sendas friskan la konsolon al vi
aŭ mi estu montopint' apika
por pliigi vian alton kaj imponon
eĉ sunlumo
eĉ printempa pluvo
ne, ĉi tio ĉio ne sufiĉas!
Mi ja devas esti kapokujo apud vi
kreski unu apud la alia
kun radikoj niaj interplektiĝantaj sub la tero
kun folioj niaj intertuŝantaj en nuboj
ĉiufoje je ventblovo
ni salutas unu al la alia
sed neniuj nian lingvon konas
vi posedas bronzajn branĉojn sur la fera
trunko,
jen similajn al ponard' kaj glavo
kaj al halebardo
dum mi havas ruĝajn grasajn florojn

similajn al pezaj veoj
kaj al bravaj torĉoj
Kune ni dividas fridan fluon, ventan tondron,
fulmofajron
ankaŭ ni kunĝuas nubnebulon, brumon,
ĉielarkon
kvazaŭ ni nin apartigus ĉiam
sed dumvive ni interligiĝas
Tio estas vera amo
tie ĉi troviĝas fideleco:
ne nur vian korpon amas mi
sed ankoraŭ vian persistecon kaj la teron sub
vi.



elĉinigi **Mandio (Ĉinujo)**

Wally du Temple (Kanado)



Tagnokte

Mi ofte havas samajn ideojn.
Ĉu arboj maltrankviliĝas
Kiam la samaj ventoj trablovas
Iliajn verdajn kapojn
Tagnokte?

La brasiko

En ĝardeno kion faras vi brasiko?
Ignoras limakojn ĉar vi kaŝas kapon?
En verda osteca ŝelo de testudo?
Ĉu por aktori faris vi karapacon?

Kaj gratas la grundon por demeti ovojn
El sino via, de ventro tro volupta.
Finu nun viajn teatrajn seksprovojn!
Idoj pretas rampi por marnaĝo nupta.

La florbrasiko

La florbrasiko plenigas palan cerbon
Per sekretaj la seksvivoj de ĉiaj
Plantoj ; pri fruktiĝaj klaĉoj plej
diversaj.
Skribas kuratore en karnecan lobon
Notas verdajn fantaziojn, fiorgiaj
Volvas node en pensigaj vegetkodoj
Sekuro de amoroj en grizaj faldoj,
Pro mitozosporaj perfid-fungoj fiaj.
Nesekse reproduktiĝantaj spionoj.
Sub grunda policanaro de ĝardenoj.

La karoto

Ĉu ni punu seksvoremajn la karotojn
Kiuĵ fikas arde teron sen permesojn
Firme, rigide, per daŭraj plonĝaj agoj
Dum ĉiaj la someraj varmegaj tagoj
Ili emas terpatrinon plezurigi
Neniam pensas reagon pridemandi.
Ĉu ni boris bone? Ĉu ni faru plie?
La Terpatrinon homoj perfortas scie.
Senkulpa karoto laŭnaturas pie.

La cepo

La cepo amas sin ĉirkaŭbrake
Premas amore ĉiutavole.

Diafane ĝia haŭto urĝas.
Pli profunde, pli profunde volas
La cepo vokalumas sensone
Dum O,o,oj,oj etumas globe
Ĝis travidebla koro plej amata
Aperas kiel punkto 'Omega'.
Se Evo manĝis biblie cepon
Anstataŭ diable tian pomon
Ĉu estus malpli da homaj ploroj
Pli da amoroj aŭ homaj gloroj?

Ivaniĉka Maĝarova (Bulgario)



La gravediĝo kaj
l' naskiĝo? La vivo
havas gravecon.



Mildaj manplatoj
petas. Nokto solecas.
Mankas lampiroj.



Belaj memoroj –
trezoro de la koro
malrapide mortas.



Soleca grilet'
venis al mi gaste. Kaj
ni trinkis kafon.

Sero (Ĉinujo)

Dankemon

Dankemon
al gepatroj miaj
kiuj liveris al mi
ŝancon lerni en lernejo
eĉ dum malfacila tempo.
Dankemon
al miaj instruistoj,
kiuj donis al mi
sciojn kaj kuraĝigon

ĉe l' turnopunkto de l' vivvojo.
 Dankemon
 al miaj fratoj,
 kiuj ĉiam donas
 al mi helpojn kaj zorgemon
 dum mia tuta vivo.
 Dankemon
 al lernantoj miaj,
 kiuj alportas al mi
 sincerecon kaj ĝojon.
 Dankemon
 al tiuj, kiuj min helpis
 en konkero super malfaciloj.
 Dankemon
 al tiuj, kiuj min vundis
 kaj lernigis al mi,
 kion mi devas plej alte taksi.



Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO DEKDUA

La ĉielo kaj la tero

§12-12

Kiam Men Wugui kaj Chizhang Manji rigardis la defiladon de la armeo de la reĝo Wu, Chizhang Manji diris:

“La reĝo Wu estas malsupera al la reĝo Shun. Jen kial li estas reduktita al la uzo de forto.”

“Sed,” demandis Men Wugui, “ĉu la reĝo

Shun ekregis en la tempo, kiam la mondo estis en bona ordo aŭ jam en malordo?”

“Se tiam ĉiuj en la mondo deziris, ke la mondo estu en bona ordo, kial ili devus elekti Shun kiel sian reĝon? Ordigante la mondon, la reĝo Shun estis kiel kuracisto preskribanta medikamenton kontraŭ tinio. Peruko estas bezonata tiam, kiam oni kalviĝis, same kiel kuracisto estas bezonata tiam, kiam oni malsaniĝis. Li estis ankaŭ kiel sindona filo, kiu, kun deprimita mieno, estis alportanta medikamenton al sia patro. Sed la saĝulo hontus agi eĉ tiele (ĉar li povas fari nenion, por evitigi al sia patro la malsanon — trad.).

“En la mondo, kie regas la Taŭo, oni ne honoras saĝajn homojn, nek enoficigas talentulojn. La regantoj superregas kiel la supraj branĉoj de arbo, kaj la popolo estas tiel libera, kiel cervoj en la sovaĝejo. La popolo estas justa, sed oni ne scias, kio estas la justeco. La popolo estas humana, sed oni ne scias, kio estas la humaneco. La popolo estas honesta, sed oni ne scias, kio estas la honesteco. La popolo tenas sian parolon, sed oni ne scias, kio estas la fidindeco. Ili estas simplanima kaj helpema, sed oni ne scias, kio estas la bonkoreco. Tial iliaj agoj lasas nenian postesignojn, kaj ilia historio ne estas transdonita al la posteuloj.”

La sindona filo, kiu ne flatas siajn gepatrojn, kaj la lojala ministro, kiu ne humilaĉas al sia regnestro, ja havas la plej bonan virton de filoj kaj ministroj respektive. Se filo aprobas ĉion, kion liaj gepatroj diras, kaj laŭdas ĉion, kion liaj gepatroj faras, oni diras, ke li estas filo malinda. Se ministro aprobas ĉion, kion lia regnestro diras, kaj laŭdas ĉion, kion lia regnestro faras, oni diras, ke li estas ministro mallojala.

Kaj tamen oni ne scias, ĉu la ĝenerala opinio devas esti ĝusta. Fakte estas, ke tiuj, kiuj konsentas kun ĉio, kion la ĝenerala opinio aprobas, kaj laŭdas ĉion, kion la ĝenerala opinio laŭdas, ne estas rigardataj kiel flatuloj.

Ĉu do la ĝenerala opinio estas pli respektinda, ol la gepatroj? Ĉu do la ĝenerala opinio estas pli honorinda, ol la regnestro? Se oni nomos nin flatuloj, ni certe eksplodos de kolero, kaj tamen, en efektiveco, ni ja flatas la homojn kaj penas plaĉi al ili per ridetoj kaj belaj vortoj dum la tuta vivo sen ke oni nin riproĉus. Bele vestitaj kaj ornamitaj, prenante ŝajnitajn pozojn kaj ridan mienon, ni penas flataĉi la tutan mondon, kaj ni tamen ne rigardas nin kiel flatulojn. Kiel stultaj ni estas! Se ni konscias, ke ni mem estas stultaj, ni ankoraŭ ne estas homoj plej stultaj; se ni konscias, ke ni estas konfuzkapaj, ni ankoraŭ ne estas homoj plej konfuzkapaj. Tiuj, kiuj estas la plej konfuzkapaj, neniam senigos sin je sia malklarmenseco dum la tuta vivo; tiuj, kiuj estas la plej stultaj, neniam fariĝos inteligentaj dum la tuta vivo.

Kiam tri homoj kune promenas kaj unu el ili estas konfuzkapa, ili povos atingi sian celon, ĉar nur unu estas malklarmensa. Kiam tri homoj kune promenas kaj du el ili estas konfuzkapaj, ili laciĝos de marŝado kaj ne povos atingi sian celon, ĉar la plimulto el ili estas malklarmensa. Kvankam mi scias la celon, tamen mi ne estas sufiĉe forta, por doni helpon al la aliaj. Kiel bedaŭrinde!

La vilaĝanoj ne povas kompreni la grandan muzikon, sed la popularaj kantoj, kiaj estas *Rompante Salikan Branĉeton* kaj *Brilkolora Floro* elvokas ridegon ĉe ili. Tial altaj paroloj ne restas en la koro de la ordinaraj homoj, kaj granda vero ne povas esti elparolata de ili, ĉar superregas nur vulgaraj paroloj.

En la nuna tempo la homoj en la tuta mondo estas konfuzitaj. Kvankam mi scias la direkton, kiel do mi, konfuzita, povus atingi la celon? Scii, ke io estas nefarebla, kaj tamen persisti en sia farado — jen ankoraŭ alia konfuzaĵo! Sekve estas preferinde forlasi la pensadon. Se mi ne plu pensos pri tio, tiam neniuj divididos mian malĝojon!

§12-13

Kiam malbela virino naskas infanon en la noktomezo, ŝi tuj venigos lampon por rigardi kun la timo, ĉu ĝi estus ŝia bildo.

§12-14

Oni segis la trunkon de centjara arbo por fari el ĝi oferajn vazojn, kiujn oni pentras en verda kaj flava koloroj, dum la stumpo restas en la fosaĵo. Se ni komparas la oferajn vazojn kun la stumpo en la fosaĵo, la unuaj estas belaj kaj aprezataj kaj la dua estas malbela kaj neglektata, sed estas egale, ke ambaŭ perdis sian denaskan naturon. Se ni komparas la rabiston Zhi kun Zeng Can kaj Shi Qiu, iliaj kondutoj estas malsamaj, sed ili ĉiuj perdis sian denaskan naturon.

La perdo de la denaska naturo okazas en kvin manieroj. Unue, la kvin koloroj konfuzas la okulojn kaj ilin malakrigas. Due, la kvin muzikaj sonoj konfuzas la orelojn kaj ilin malakrigas. Trie, la kvin odoroj konfuzas la nazon kaj ĝin ŝtopas. Kvare, la kvin gustoj malpurigas la buŝon kaj difektas la gustumadon. Kvine, deziro kaj maldeziro malkvietigas la menson kaj malbonigas la naturon. Tiuj ĉi kvin malbonoj estas katastrofoj damaĝantaj la homan denaskan naturon. Tamen la filozofoj Yang Zhu kaj Mo Di konkure ĉasas ĉi tiujn malbonojn kaj disputas inter si pensante, ke ili ambaŭ estas pravaj kaj jam atingis ion. Se ĉiu el ili estas katenataj de sia atingo, ĉu ni povus nomi ĝin “atingo”? Se tio povas esti konsiderata kiel “atingo”, ankaŭ la enkaŝigitaj turtoj kaj strigoj povas esti rigardataj kiel ion jam atingintaj. Krome, deziroj kaj maldeziroj, sonoj kaj koloroj jam plenigas kiel brulpajloj ilian menson; plumornamitaj ĉapoj, regnoficistaj tabuletoj kaj longaj zonoj jam katenas ilian korpon. Kun brulpajlo interne kaj ligŝnuroj ekstere, ili pensas, ke ili jam atingis ion tiam, kiam ili estas en streĉa ligiteco. Tiukaze

ankaŭ la krimulo kun siaj brakoj ŝnurligitaj sur la dorso kaj kun siaj fingroj en tortura premilo, kaj la tigro kaj la leopardo enfermitaj en sako antaŭ ol esti enmetitaj en kaĝon, povas esti rigardataj kiel ion atingintaj.



elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Jadranka Miric (Serbujo)



Aŭtuna vidaĵo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Aŭtuna
posttagmeza hor'
Malheliĝas ĉielo.
Pro fulmo timiĝas kor'.
Birdoj flugis for.
.
Aŭtuna
ŝtormeto kurtas.
Trompas nin aĉa veter'
Homoj sin varme vestas
kaj fi lamentas..

Videblas
pluvofloketo.
Ĉielo kvietiĝis
Jen, kuranta hundeto
laŭ stratvoĵeto.

Krepusko
iĝas viola.
Post suna aperado
eĉ tero iĝas mola.
Nur vi, ve, sola.

Oriĝas
ŝprucofontano.
Sunsubiro nestis sur
la pinto de kaŝtano.
Sur ŝtipo pano.

Yanke (Ĉinujo)

Neĝkovrita vilaĝo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

La neĝo
flirtas leĝere
super soleca vilaĝ'
falas, falas libere
ŝajne fabele.

Ĝi kovras
per blanka reto
la teron ankoraŭ ne
dormantan en kvieto
sub vent-baleta.

Ĝi estas
neĝo favora
al novjara rikolto
sub homa fervora
peno labora.

Lamplumo
brilas endome.
Oni babilas varme
pri laborplan' laŭtsone
senfanfarone.

Imagas

ili libere
al si l' scenojn de l' rikolt'
profitdona espere
abunda vere.

Pleniĝas
etoso varma
en domoj de l' kampuloj
kun parolfluo svarma,
promeso ĉarma.

Jam ili
forĝas vere
neĝofalon flirtantan
kaj malvarmon ekstere
ja enaere.

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma
poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimarango
xa,xa,a (x=senrima).*

Eto (Ĉinujo)

Bruema urbo

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*
Bru'
l' urba sonas en enu'
ĉiame
je nia malĝu'.

Hup'
sonoras de aŭta grup'—
jen vere
orelpika kulp'.

Muĝ'
buldoza en takta urĝ'
navedas
kvazaŭ en kur-fuĝ'.

Kri'
reklama kun energi'
laŭtegas
por onia sci'.

Jen
urb' la tuta dronas en
strangola
voĉbrua ĉagren'.

Vivovojo

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*
Viv'
estas ari' de kreiv'
en aer'
fluganta en driv'.

Mi,
ludanto de l' melodi',
ĝin plektas
laŭ mia raci'.

Flu'
ĝi estas kun ĝoja bru',
libere
forkure kun ĝu'.

Vel'
mi estas sur la river'
zorganta
jen pri onda pel'.



Fort'
vi estas en mia sort',
mi de vi
dependas ĝis mort'.

Kor'
mia de l' korpa motor'
vi estas

sen ajna langvor’.

Se
ĝi daŭras sufiĉe tre,
progresas
mi ja sen pane’.

**Deskses-Silabo: ĉina fikforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

Anna Maŝarova

Pri Irena kaj hunda renkontiĝo

Kiam rizenŝnaŭcero* Vitas ricevis titolon de Ĉampiono de Rusio, al li oni komencis direkti hundinojn el hundklubo por koncipoj. Hundidoj rezultis kiel paĉjo – ili estis samaj ostecaj kaj trankvilaj. Tial Vitas havis grandegan popularecon de posedantoj de hundinoj. Ĉio estus bone, sed en hejmo ne estis telefono. Ofte posedantoj de hundinoj ne povis komunikiĝi kun mastrino de Vitas kaj alveturis neatendinte kaj neĝustatempe. Tial Anna devis viziti hundklubon en ĉiu sabato por ekscii, kiam oni planas vican renkontiĝon por koncipoj.

Sed en tiu fojo ŝi ne povis viziti klubon, ĉar semajno estis tre klopoda. Ĉe ŝi estis naskiĝtago, oni decidis festi en sabato, por ke gastoj povu sidi pli longe kaj ne rapidu al hejmo. Kaj gastigantoj povus pli longe dormi en dimanĉo kaj ripozi antaŭ labortagoj post klopoda semajno.

En kulmino de gajeco soniĝis sonoro. Edzo mire levis brovojn – por malfruantaj gastoj estis jam malfrue, kaj ĉiuj gastoj jam kolektiĝis. Anna responde mire levis ŝultrojn, prenis de telero pecon de travidebla, kun sukcenkolora graso, salmo, metis ĝin en buŝon kaj iris al antaŭĉambro.

– Anna, mi iras kun vi, nemulte fumos, – kuzino Irena pompe iris tuj post kaj komencis

serĉi cigaredojn en poŝoj.

Vitas ekscite skuante felon sur spino brue flaris enŝovinte nazon en fendon inter pordo kaj fosto. Nervoze tremanta stumpo de vosto signalis pri tio, ke post pordo estas kvankam nekonata homo sed persono agrabla kaj ne danĝera.

– Vitas, iru lokon, – Anna rapide finmanĝante fiŝon ordigis harojn antaŭ spegulo.

Virhundo ĉagrene ekspiris, ankoraŭfoje flaris odoron de starinta post pordo gasto, kontente nazbruis kaj nevolonte iris al sia sternaĵo.

Naskiĝtagulino malfermis pordon. Sur sojlo agrabla viro staris konfuze ridetante. Lia aĝo estis proksimume tridek kvin jaroj.

– Saluton, Anna. Pardonu min, ke mi venis tiel malfrue.

– Bagatelo! Saluton! – gastigantino gasteme ridetis kaj peneme provis rememori, kiu estas li. Fine decidinte, ke li estas kolego de edzo, ŝi faris paŝon reen invitante eniri.

Viro eniris al antaŭĉambro kaj konfuze haltis sur tapiŝo:

– Mi ĉi tie makulos al vi.



Ilustraĵo de Tatjana Ĥomjakova

– Ne maltrankvilu, ni forviŝos, – Irena diris eligante ringeton de fumo kaj kun

